

The
NORTH AMERICAN
ESPERANTO REVIEW



Presenting:

NEW AUTHOR: EILEEN MECHLING

NEW ARTIST: BILL WALKER

IF YOU'RE NOT AN ESPERANTIST, SAVE THIS COPY
AND LEARN ESPERANTO, JUST TO ENJOY THEIR WORK

NORDAMERIKA ESPERANTO-REVIUO.

Majo - Junio • 1958

NI PETAS

KE ONI ATENTU LA ADRESON
DE LA REVUO

La adreso citita en la Jarlibro de UEA,
1957, estas malnova adreso.

La nuna adreso de la *Revuo* estas:
North American Esperanto Review
2116 North 35th St., Seattle 3, Wash.,
Usono.

La redaktoro estas:
F. R. Carlson, sama adreso.

The North American Esperanto Review

Published bi-monthly by the ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., as its official organ. Subscription free to members. Subscription for non-members: \$1.75 per year. Other rates: Bulk orders of 15 or 30 copies of any issue may be ordered, in advance, by members, for 60c and \$1.00 respectively; gift subscriptions for schools, libraries, eminent persons, etc., and for Esperantists living in countries outside of North America, may be purchased by members for 30c per year. (The *Review* reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.)

THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., is a non-profit organization to encourage the use of the International Language, Esperanto. *Secretary*: Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pa. *Treasurer*: Edward W. Pharo, Jr., 220 County Line Rd., Somerton 16, Pennsylvania.

Membership Dues: Regular Members, \$3.; Supporting Member, \$5.; Patron, \$10; Life Member, \$50; Man and wife, each having privileges of Regular Member, but receiving only one copy of publications, etc., \$4.00.

Make all checks and money orders payable to "Esperanto League for North America, Inc."

The North American Esperanto Review

(*Nordamerika Esperanto-Revuo*)

Vol. 6, No. 3.

May-June, 1958

The Review not only permits, but invites, reprinting of material from its pages, except where special notice, such as notice of copyright, appears.

La Revuo ne nur permesas, sed invitas, represon, escepte kie aperas speciala noto limiga pri kopiado.

CONTENTS (English) Page

Come where the sun is shining	2
Congress Program	2
Esperanto in North America	3
Zamenhof — Philologist or Poet?	10
Official Decisions	14
Officers of ELNA	14
Local Addresses	15
The Case of Mr. Gluck	15
Complete Grammar and Pronunciation of Esperanto.	Inside Back Cover

ENHAVO (Esperanta) Paĝo

Ni Prezentas — Bill Walker	1
Bonvolu Skribi	4
Nia Literaturo	5
Trans la Lingvajn Barilojn	6
La Tago Kiam la Bestoj Interparolis	8
Lokaj Adresoj	15
Konu Viajn Gesamideanojn	16
Helpo al Hungaraj Esperantistoj	16

Come to the National Congress of Esperanto

See page 2 for details


The NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 6

May-June, 1958

No. 3

Ni fiere prezentas
la novan artiston
de la Revuo



Walker



“Ĉu vi devas ĉiam legi Esperanton?”



“Saluton, marsanoj-samideanoj!”

(Redaktora noto: Vi kredeble ne povos ĉeesti
la 31an kunvenon de Marsa Esperanto-Ligo.
Venu do al nia kongreso.)

La Revuo kaj Bill Walker invitas, ke aliaj gazetoj kopiu liajn desegnaĵojn laŭvole.
No copyright. Other publications are invited to copy Bill Walker's drawings.

♪ Come where the sun is shining ♪

COME TO SAN DIEGO, to the land of the short thermometer — daily average temperature in summer 70°, winter 54°

Come where you can swim in the blue Pacific, build a snow man, and bask in the desert sun, all in one pleasant lazy day. See the early California missions, Ramona's Marriage Place (to be included in a Congress tour), world-famous Balboa Park Zoo, Palomar Observatory.

Fish for tuna, barracuda or marlin, ride a surfboard at the ocean beach, join the nightly square dance on the beach. See Uncle Sam's battlewagons.

When you come to the Congress, plan on at least a week additional, to enjoy America's International Playground.

Congress Program

July 10: 7:30 p. m., mixer, Club Room of Hotel San Diego.

July 11: Morning, business meeting. 1:00 p. m., excursion to Point Loma, farthest southwest point in U. S.; Mission Bay, California's water playground; Mission Valley, old Spanish missions. 7:30 p. m., official reception. Mayor Charles Dail will welcome the Congress.

July 12: Noon luncheon in a restaurant in the old quarter of San Diego; visit to historic points in this section; official photograph. 3:30 p. m., business meeting. 7:00 p. m., banquet, followed by speeches and entertainment.

July 13: Morning, business session. 11:00 a. m., religious service. 1:00 p. m., official close of Congress.

CONGRESS FEE \$10 — includes cost of banquet, one other meal, excursion.

COME TO THE HOTEL SAN DIEGO, seat of the Esperanto Congress and one of the city's most popular centers of social activity.

The big event, of course, of this second weekend of July will be the Esperanto Congress. If you stay at the San Diego, you'll be at the center of Congress activity. The location, on Broadway at State, is also handy to transportation terminals, the shopping district and all the things you'll want to see.

Prices are reasonable — from \$6 up. Yet you'll get the best in comfort, service and good food.

Write Now --- right now

to: Esperanto Congress Committee, P. O. Box 6215, San Diego 6, California.

The Local Congress Committee can arrange your hotel reservations, if sent with your Congress registration.

DO NOT send ballots in envelope with other correspondence.

TUNE TO KFMB

On July 11, at 12:10 p. m., radio station KFMB will present an interview with leaders of the Esperanto movement.

HELP US BOOST SALES OF ESPERANTO BOOKS

Send us the names and addresses of book stores and other book sellers in your city and surrounding area, so we can contact them to get "Teach Yourself Esperanto" (\$2.75) sold there.

Conrad Fisher, Secretary,
Meadville, Pennsylvania.

SEE YOU IN SAN DIEGO

Esperanto in North America

DID YOU HEAR? - - -

Alex Dreier, NBC commentator, in the "Man On The Go" show, Monday, April 28? It was an extensive feature on Esperanto, based on information furnished to Dick Bruner, of NBC's news staff, by Conrad Fisher.

ORLANDO, FLA.— The *Orlando Sentinel* "Public Thought" section has been presenting a lively controversy between our Robert Blackstone and a Mr. Donald Thompson, who thinks that Esperanto is a "dead language".

Let not the Sentinel's challenge go unanswered! Mr. Blackstone asks all Esperantists to write to the editor and let him know that Esperanto is very much alive.

Write to: Editor, Public Thought,
Orlando Sentinel, Orlando, Florida.

SAN DIEGO, CAL.— The Convention and Tourist Bureau has published a 5000-copy edition of a leaflet, "San Diego, Kalifornio — La Internacia Ludejo de Ameriko", with color pictures of San Diego and text partly in English, partly in Esperanto.

Letters of appreciation from those who have received the folder and requests for copies from those who did not are very much in order. It is a nice folder, and should be in every Esperanto display.

Write to: Convention and Tourist Bureau, San Diego 1, California.

Among interesting items of the May meeting: tape recordings of Esperantists in Italy and Denmark and of a greeting from the Mayor of Mainz, Germany, to all Esperantists, inviting them to the Universal Congress of Esperanto; a short film of Dirk Brink's trip through Europe and his visit to the 1957 Universal Congress.

ST. LOUIS, MO.— The Central Public Library, in May, presented an exhibit, "Seventy Years of Esperanto", widely advertised by the local Esperanto group.

PITTSBURGH, PA.— Franz Jahger, whose writeup in the *Pittsburgh Sun-Telegraph* was mentioned in our April issue, was recently interviewed on radio station KDKA and had an article (with photo) printed in *The Machinist*, organ of I. A. M.

LOS ANGELES, CAL.— The club now has a club library, established with books donated by members. (Does your local group have a club library, or donate books to a public library, so that members and students can borrow and read them?)

At the April meeting the Santa Monica group presented the play "Komerca Gedzigo". Mr. Scherer and Mr. Chomette gave talks on Esperanto at a Lions Club luncheon, March 25.

SEATTLE, WASH.— The May 17 meeting was "eavesdropped" by a new tape recorder, and the conversations played back to the unsuspecting members. The club will soon get in the swim of international exchange of club recordings, and also hopes to improve its teaching by recordings.

CHICAGO, ILL.— At the third intercontinental conference of Baha'i, attended by 1652 persons from 32 countries, the participants were asked to repeat the same prayer in their various languages. Esperanto was one of 20 languages used.

THE LOCAL GROUP

is the basic unit of the Esperanto movement. Let's have regular reports showing activity in *your* area.

COME TO SAN DIEGO!

Bonvolu Skribi

La *Revuo* presas senpage (sed foje mallongigas) korespondpetojn el aliaj landoj. Tiuj anoncoj aperas nur se, kaj kiam, konvenas al la redakcio (ĝis nun ni senprokraste presis ĉiujn, kies adresojn ni povis legi), kaj ili temu nur pri korespondado *en Esperanto*. Por certigi nepran aperon, oni pagu \$1 ĝis 4 paĝvastaj linioj. Se resendadreso ne estas legebla, ĝi estas nek presebla, nek presinda, do ne presota. SKRIBU KLARE!

MALLONGIGOJ: Dez., deziras; kor., korespondi; pk., poŝtkarto; bk., bildkarto; pm., poŝtmarko; gaz., gazeto; il., ilustrita; interŝ., interŝanĝi.

Haldan Agnar, 6519 Specht Ave., Bell Gardens, California, Usono. Dez. kor. kun arkideo-kulturistoj de la tuta mondo.

Štefan Zaboĵ, Sidlište ĉ. 683, Banovce n/Bebravov, Ĉeĥoslovakio. Por Esperanta ekspozicio en diversaj urboj, dez. bk., turistajn prospektojn, Esp.-afiŝojn, gaz., ktp.

Helene Havranek, Wien 22/148, Aurikelweg 38, Aŭstrio. 50-jara. Pri ĉiuj temoj.

S-ro Bánáti István, Békéscsaba, I. Bánát u. 26, Hungarujo. Pli ol 30 geesp-istoj dez. kor., interŝ. bk., ktp. tutmonde.

Raúl Juárez-Sedeño, Apartado 570, Camagüey, Kubo. Dez. interŝ. diapozitivojn por projekcio de lumbildoj kun ĉiuj landoj.

D-ro Stefan P. Moskov, ul. „Proff. Moskov” N 6, Sevlievo, Bulgario. Dez. seriozan interŝ. de neuzitaj pm. kun Eŭropo, Ameriko kaj Japanio.

Szmidt Włodzimierz, Pruszkow k/w-wy, poŝtkesto 29, Pollando. 24-jara fraŭlo dez. kor. per leteroj aŭ bk. pri ĉiuj temoj kun juna fraŭlino en Usono.

F-ino Maunik Hachik, Struma 5, Rousse, Bulgario. 22-jara. Pri Usono, modo, kino.

Boris Fedorov, ul. Nekrasova 88, kv. 32, Jaroslavl 24, USSR. Dez. kor., interŝ. ilustritajn poŝtkartojn, pm.

Ivan Šavkun, Gorkij — 43, pr. Kirovoi, 8-1, USSR. Aŭtomobil-teknikisto en fabriko. Dez. kor. kun usonanoj, lerni pri usonaj popolvivo, moroj, kutimoj, naturo, labor-kondiĉoj, ktp., interŝ. bk., il. gaz. Povas skribi pri sporto, literaturo, scienco, ktp.

Zamenhofa Junulara Servo, Budapeŝt 119, Poŝtkesto 6, Hungarujo. Por ekspozicio de Internacia Ligo de Esp-istaj Fotofilmmatoroj, sendu al tiu adreso kolorajn il. pk., pri la vivo de esp-istoj, pejzaĝoj, naturo, vivo de gejunuloj, ktp. Oni rekompencos per pm. Ankaŭ dez. ne plu deziratajn ekzemplerojn de ĉiaj E-gazetoj.

(S-ino) Mara Edwards, 1406 N. Sycamore Ave., Hollywood 28, Calif. Usono. Dez. kor. kun personoj en Germanujo, Hispanujo, Meksikio aŭ Sudameriko.


S-ino Mária Boros, Rákóczi-út 27-A, Budapeŝt VIII, Hungario. Lernantino, pli ol mezaĝa simpatia virino.

F-ino Kaneda Teruko, 2-470, Zoshigaya, Toshima-ku, Tokio, Japanujo. 20-jara studentino. Pri Usono. Interŝ. bk.

A. P. Tomilov, Baku 33, Montino, ariagorodok, d. 3, kv. 14, USSR. Dez. kor., interŝ. pm. kaj bk.

Ivan Fabjan, Planina 2, Kranj, Slovenio, Jugoslavia. 22-jara teknikisto. Dez. kor. kun usona fraŭlino.

Tiboro Horvath, Gyongos, Petofi str. 71, Hungario. Instruisto. Dez. kor. kun la religiaj esperantistoj pri religia ideo, kaj pri ĝeneralaj temoj.



Nia Literaturo

Literatura Redaktoro: D. B. Richardson, 3412 North Mullen, Tacoma 7, Washington (La libroj recenzitaj en ĉi tiu rubriko estas mendeblaj ĉe: Esperanto League Book Service, Middleton, Wis.)

Feliĉe, la krizaj tempoj nunaj ne tuŝis la publikigadon de bonaj Esperantaj libroj, kiuj eldoniĝas ankoraŭ en riĉa rikolto. Temas ĉefe pri *Angla Antologio*, eldonita de UEA, kaj *Kien la Poezio* de novzelandano Brendon Clark, eldonita de The Esperanto Publishing Co.

Angla Antologio, redaktita de William Auld kaj Reto Rossetti kaj prezentanta tradukojn de pluraj kompetentaj Esperantaj beletristoj, estas grava ero en nia tutmonda serioza literaturo. La libro, kiu ampleksas 319 tre densajn paĝojn, traktas la elstarajn prozan kaj poezian literaturojn de anglujo de la jaroj 1000 ĝis 1800. Sekvos volumoj pri angla literaturo 1800-1950 kaj skota antologio 1000-1950.

La tradukoj estas ĝenerale kompetentaj, aferemaj. La stilo estas, kiel oni povus antaŭsupozi, laŭ la nunmoda skota skolo.

Brendon Clark, kies libro pri Esperanta poezio aperis unu jaron post lia morto,

estas unika en la rangoj de la samideanoj-literaturistoj pro sia energia staro rilate al "pura" Esperanto en la beletro. Li submetis sin al rigora disciplino, verkante kaj tradukante *tute sen uzo de elizio* kaj specialaj neologismoj, t. e., utiligante nur la normalan, konversacian lingvon. La rezulto estas, ke lia poezio havas pli fluan sonon kaj pli plaĉan aperon ol la kutima poezio de hodiaŭ, trapiprita per apostrofoj kaj postulanta du- aŭ tri-fojan legadon por kompreniĝo.

Kien la Poezio entenas klarigajn eseojn de la aŭtoro pri la principoj, laŭ kiuj li verkis poezion, kaj ankaŭ 65 originalajn kaj tradukitajn poemojn por demonstri lian stilon.

Brendon Clark ne proponis, ke ĉiuj aŭtoroj de Esperanta poezio akceptu liajn striktajn principojn; li volis nur instigi, ke oni provu verki, kiel eble, en la normala lingvo de la konversacio. Tiucele, li dediĉis sin al la tasko prui ke tio estas ja ebla.

Clark tamen verkis almenaŭ unu poemon kun elizio — sed ĝi estis burleska imito de tiu sama stilo, kiun li tiom malestimis:

Singultante

Vi kiu scias, kiom mi
Protestis kontraŭ elizi',
Sendube miras pri poem'
De mia plum' kun tia em'.
Ne kredu, mia bonamik',
Ke temas tiu ĉi lirik'
Pri ŝanĝ' al mia opini'
Rilate al la elizi'.
Ne! mia poezia naŭz'
Rezultas el esplora paŭz'
Por ke, laŭ l' elizia kult'
Mi provu skandi per singult'.

Esperanto League for North America

is building an effective movement in North America for

We need your help

ESPERANTO NOW!

Join now

Trans la Lingvajn Barilojn

Francis kaj Bonnie Helmuth, el San Diego, komencis lerni Esperanton en Aprilo, 1955. Post jaro kaj duono ili entreprenis unujaran vojaĝon tra Eŭropo, kaj raportis al ni.

VALENCIO, HISPANIO 9 Januaro, 1957 — Ni alvenis per la ŝipo "Ciudad de Ibiza", je 7:30 atm., la 1an de januaro. Tagmeze ni renkontis S-ron Tudela, UEA-delegiton, kaj li akompanis nin dum du horoj, al la centro de la urbo kaj al la nova stadio kie oni ludas la nacian ludon, piedpilkon. La bela, moderna stadio kapablas enteni sesdek mil personojn. Vespere Bonnie kaj mi vizitis tipan valencian restoracion kie ni manĝis la valencian manĝaĵon "paella", bongustegan manĝaĵon el rizo, rostita kokino, artiŝokaj koroj, helikoj kaj spicoj. Per helpo de botelo da vino, ni manĝis grandan kaserolon da paella.

La sekvantan tagon D-ro Herrero venis por bonvenigi nin al la bela urbo Valencio. Li estas prezidanto de la Hispana Esperanto-Federacio, tre vigla, sperta Esperantisto. En lia aŭtomobilo, inter liaj vizitoj al klientoj kaj pacientoj, ni interparolis Esperante kaj li montris al ni vidindaĵojn en la urbo. Post tri horoj li finis sian laboron kaj ni haltis en kafejo por trinkaĵo kaj gustumis tipan hispanan marmanĝaĵon, "sepias al la plancho", (pecoj de sepioj, frititaj en oleo kun iomete da citrono). Vespere ni rerenkontiĝis ĉe kafejo kie ni renkontis alian malnovan esperantiston, S-ron Bosch. Ni ĝuis unuhoran interparolon kun S-ro Bosch kaj D-ro Herrero kaj gustumis valencian trinkaĵon "poleo" (similas al verda teo kun menta gusto).


Ĵaŭdon ni transloĝiĝis al la hotelo Munich, rekomendita de D-ro Herrero ĉar nia alia restloko estis malkomforta. Matene, S-ro Tudela akompanis nin al la banko por traduki por ni pri monaj aferoj. Posttagmeze ni iris al la hejmo de S-ro Herrero, kie ni renkontis lian edzinon, kiu estas studanta Esperanton, kaj ilian sepjaran filinon.

La sekvantan tagon D-ro Herrero gvidis nin, aŭtomobile, al la kamparo por montri al ni vilaĝon kie la domoj estas subteraj. La vilaĝanoj loĝas en domoj fositaj el la malmola tero; tre komfortaj, vastaj kaj puraj hejmoj. Ni trinkis vinon en trinkejo konstruita per la sama metodo kiel la domoj, kaj ankaŭ ĝi estis vasta, tre pura ejo. Ĉi tiu vilaĝo, Paternia, enhavas proksimume mil subterajn domojn. Laŭvide ĝi konsistas el nur fosaĵoj por la enirejoj kaj blankaj kamentuboj por ventoli la domojn.

Sabaton okazis la kunveno de la valencia Esperanto-grupo, ĉe kafejo en la centra parto de la urbo. Tie ni renkontis kelkajn valenciajn Esperantistojn, kiuj demandis aj ni pri niaj urbo kaj lando kaj pri la Esperanta movado en San Diego. Je la sesa okazis radio-programo kaj dum duonhoro D-ro Herrero faris demandojn kaj ni parolis pri nia vojaĝo en Eŭropo. Estis bona propagando por Esperanto ĉar pli ol sesaŭ sep mil personoj aŭdis pri Esperanto per la radio. Post la programo S-ro Ernesto Hurtado gvidis nin al la ĉefa placo por rigardi paradon. Estis la Tago de la Tri Reĝoj, kaj multaj infanoj estis laŭlonge de la stratoj kiam la longa procesio pasis. En Hispanio la infanoj ricevas multajn donacojn je la 6a de januaro, la Tago de la Tri Reĝoj, anstataŭ je Kristnasko.

Ni iris al la kamparo dimanĉon kaj tie renkontis Ges-rojn Bosch kaj Lenaars. Ni promenis tra la kamparo kaj poste ni tagmanĝis bongustajn angilojn. Dum la tuta tago ni denove povis uzi kaj praktiki la internacian lingvon, kaj estis same kiel kiam mi ĝuis tagon hejme kun miaj samlandanoj kaj samlingvanoj.

Renkontu la vojaĝintojn ĉe la Kongreso!



DONATIONS TO THE REVIEW

Glenn Turner	\$21.18*
F. R. Carlson	48.61
F. J. Dubois	5.00
Jos. R. Scherer	5.00
A. Holzhaus	7.86
Geo. E. Wagner	3.00

*Mr. Turner donates to the Review 25% of all money received from sales by ELNA Book Service, except wholesale orders for resale. On these, the 25% goes as discount to the purchaser.

Every local group should be a retail outlet for Esperanto books (using the 25% profit for local activities).

The Review needs the share it receives from your retail purchases, too (also any spare dollars you can donate). You are getting a de luxe magazine, which costs about 15¢ for every copy printed and mailed, even though the editor does most of the work (without pay) and also pays all costs of type, cuts (pictures, etc.), machinery and equipment.

So get those book orders in *now* to:

ELNA Book Service, Middleton, Wis.

The following helped in the above donation to the Review by their book orders to ELNA Book Service:

Jenney Ferguson, Frank J. Goryski, James O. Landel, J. K. Andersen, Harry Blaine, Walter F. Scharps, Harry Gustafson, Richard H. Hart, John E. Falk, M. F. Dill, Harry A. Martin, George Falgier, Armin Doneis, W. Lee Hancock, Miss Sandra Sinkoski, R. W. Castleberry, David D. Custer, John E. Burke, Willie M. Phillips, Mrs. A. W. Billing, Helen Nixon.



ST. LOUIS ESPERANTO GROUP

Standing, left to right: Dr. J. J. Kessler, editor and author, President of St. Louis chapter, American Humanist Association; George Falgier, Esperanto instructor.

Seated, left to right: Mrs. C. Sinclair; Laura Falgier; Joe Eisele, UEA delegate; G. H. Stephens, secretary of railroad workers' union; Salvador Raia; Alta Pryor.

This is part of an Esperanto class which meets every Wednesday night at the Humanist Center in St. Louis. Six others could not be present for the photo.

The St. Louis chapter's interest in Esperanto is in implementation of a resolution adopted by the American Humanist Association two years ago, supporting the action of UNESCO and calling attention of its members to the international language problem.

The new Minister of the Interior in Guatemala, Edmundo Quinones S., is a member of the Executive Committee of the Guatemalan Esperantist Association and one of the most enthusiastic leaders of the movement.

Learn

ESPERANTO

by Correspondence

ESPERANTO-by-MAIL

123 East 35 Street Brooklyn 3, N. Y.

☆☆☆☆☆☆*****



**La Tago Kiam la Bestoj Interparolis de Eileen Mechling
Ilustrita de Bill Walker**

TAM, kiam la akvoj kiuj kovris la teron komencis retiriĝi, kaj la bestoj de la mondo estiĝis, la vivkondiĉoj densestiĝis; kvankam, kompreneble, tute ne simile al nuntempo.

Post pluraj miljaroj, la amasiĝo ĉirkaŭ la grandaj akvejoj fariĝis netolerebla. La ŝprucigado kaj saltado de fremdaj bestetoj malplaĉis al la grandegaj bestoj, kiuj foje manĝis ilin pro nura ĝeno.

Do la plimalgrandaj bestoj grumblis en la densejoj kie ili povis sendanĝere vidi, kaj observante la petoladon de la grandaj bestoj diris, "Ili ne bezonas uzi tutan tagon por ĝi, ĉu?"

Iliaj idoj malpacientiĝis, plorplendis por naĝado, kaj la gepatroj piedfrapis ilin, pro kio ĉiuj estis malkontentaj.

Fine, ĉiuj blekis, plendis, murmuregis, miaŭis kaj henis pri la stato de aferoj. Tiam amase la bestoj aperis samtempe ĉe la akvejo, kaj intencis nepre defendi siajn rajtojn.

La bruoj estis grandega. Ĉiuj parolis samtempe; vere, neniu aŭskultis alian. La elefanto malpacientiĝis tute. Li trumpeta-

dis tian grandegan krion, ke la folioj skuiĝis en la arboj tra la nigra pratemp-arbaro, kaj ĉiuj kapoj rapide turnis sin al li.

"Nun," li trumpetis, "unuope!"

La leono, kiu kondukis reĝe eĉ tiam, parolis laŭte, "Ni leonoj devas havi la akvejon apud la grandaj palmoj, ĉiuvespere."

La hieno, kiu ŝategis tiun lokon por sia propra familio, jelpis sian proteston. Nu, ni scias ke la hieno havas bedaŭrindan aspekton; li ŝajnas moki la mondon kiam li parolas. La leono, jam ofendite pro la mensogoj rondirantaj, ke leonoj timas akvon, insultiĝis plie kaj muĝis furioze.

La simioj tuj saltis al la arboj, tenegante unu la alian kaj tremante pro timo.

"Ĉu vi mokis min?" remuĝis la leono, montrante grandegajn dentojn.

"Ne, ne," la hieno senkulpige ridis time. "Mi nur volis d-d-diri ke ne estas necese

esti p-p-porko pri ĝi.”

La porko ruĝiĝis pro honto, estante nature modesta kaj malaroganta.

La serpento siblis por aŭdiĝo. La hieno kredis ke tiu siblis al li, “por honto!” Li bojis indigne, “Mi diras, ke vi tre malbone kondukas.”

Je tio, la serpento siblis pli laŭte, volviĝante kaj malvolviĝante furioze. Nun, ĉiuj iĝis tute koleraĵ.

“Mi ne restos por esti insultata.” kaj “Tel via speco ĉiam donas al mi la dispepsion.” La mokriproĉoj kaj insultoj flugis. Oni komencis puŝi kaj ŝovi, unuj la aliajn, kun flavaj okuloj lumantaj pro kolero, kun ungoj malkaŝitaj. La grandega elefanto, perdante sian kapon pro ĉi tiu maldigna elmonro, altigis sian rostron kaj komencis

Jen du gelernantoj verkas por ni! Multaj tiaj eklernu la lingvon kaj verku por nia ĝuo.

kriegi, vane batante la arbetaron sub siaj gigantaj piedoj.

Je ĉi tio, la bestoj disiĝis en konfuzo kaj kuregante vole-nevole, interbatante sin, forkuris profunden en la pratemp-arbaron.

Kaj do, ĝis ĉi tiu tago, ili ne kutimas kune paroli, memorante la unuan katastrofon; vere, ili ne povas interkompreniĝi pli ol tiam. Ja, ili ne permesas al siaj idoj ludi kun la “aliaj infanoj”; nek temanĝi la best-sinjorinoj volas unu kun aliaj. Ĉiu best-sinjoro apartenas al sia propra klubo (vi jam konas, sendube, la klubojn de la leonoj kaj de la alkoj, ktp.)

Kompreneble, diversaj best-familianoj renkontiĝas ĉe manĝlokoj sed, ĉar unu el ili ofte iĝas la ĉefmanĝaĵo, la konversacio estas mallonga.

Get the Easy, Illustrated, “Learn-it-fast” Book!

Teach Yourself Esperanto

By JOHN CRESSWELL and JOHN HARTLEY

With this book you can master the fascinating and simple international language of Esperanto in 16 easy lessons so that you can use it in reading, writing, speaking and hearing.

Each Lesson Contains:

1 Explanations in simple English of certain points of grammar, with examples.

2 A passage of reading matter embodying the same grammatical points.

3 Sketches, which not only add interest, but are designed to help in understanding the text.

4 Exercises in reading Esperanto and translating English into Esperanto. Key at the end of book.

\$2.75 • DAVID McKAY COMPANY, Inc. 55 Fifth Ave., New York 3

COME TO THE CONGRESS! SEE THE BOOK DISPLAY

Zamenhof--Philologist or Poet?

IT IS SAID that, at the first meeting of the Select Committee charged by the Continental Congress with the task of writing a "Declaration of Independence", Benjamin Franklin remarked that "no sonnet was ever written by a committee" and so he proposed that only one person be entrusted with the duty of composing the document, his candidate for the job being Thomas Jefferson.

Whether Franklin actually said these words or not is unimportant. What is important is the idea they denote. There are certain mechanical conditions that a sonnet — to be called a sonnet — must meet. These conditions are few and can be set down in 1, 2, 3 form. Anyone, including a committee, can write 14 lines so that all these conditions be met. Yet, the result will not be a sonnet. Let us see why.

When I studied rhetoric, I was taught a definition of a sonnet that I still remember verbatim to this day. "A sonnet", goes the definition, "is a poem of 14 lines divided into 2 quatrains rhyming a-b-a-b or a-b-b-a, and two tercets rhyming c-d-e . . ." Thus far, these are purely mechanical conditions but the definition then goes on to say: ". . . the 2 quatrains and 2 tercets dealing with two different aspects of the same subject but the 2 parts blending into one continuous whole of lyrical emotion."

It is this latter condition that no committee can ever meet. Only one man endowed with poetic insight can make two distinct things blend into "one continuous whole of lyrical emotion."

The construction of a language requires of the constructor the possession of the qualities of the poet rather than the faculties of the engineer. The selection of the plan for the whole and of the parts that will constitute this whole cannot be done with a slide rule, or even with the modern Univac computers. Any selection made using such mechanical or automatic devices may give a result that will be useful

as a code, but it will not be a language. Man will not take it up and use it trippingly on the tongue and breathe life into it. Only one man who possesses poetical insight can intuitively select, as a poet does, the proper form, the *live form*, that will endow his creation with life.

I speak of *life* for a language, but a language is not a living thing in the sense that a tree or a bird are living things. Rather it is alive in the sense that a city is living. A language is alive because men use it to trade, to gossip, to order a meal, as well as to make love, to sing, to pray, to praise and, yes, to curse. Man uses language to meet his daily needs, to obtain his daily bread. But man uses language also to give expression to his emotions and to convey his loftiest thoughts.

Dr. Zamenhof, scientist by vocation and philologist by avocation, was, above all, a poet. Esperanto, his creation, is as much a poem as Dante's "Divine Comedy". Only a poet can know men's souls. Only a poet who knew men's lack of logic could have come up with the master stroke of logic — the indefinite preposition "je". Otto Jespersen, the well-known philologist and opponent of Esperanto, himself declared that the creation of the indefinite preposition "je" was the work of a genius — that, had Zamenhof done nothing else but propose this preposition, he would have advanced interlinguistics by a giant step.

Jespersen's praise of Zamenhof is well deserved. However, it points out the difference in approach to the creation of a

language. Jespersen, being a philologist, has the technical man's point of view. He could never have thought of such a simple thing as an indefinite preposition, yet when a man with poetic insight presented it he could recognize its worth. To Jespersen, logic was the only yardstick that was valid. For instance, his mind ran in syllogistic form: Some languages do not have agreement between noun and adjective; these languages can express thought without such agreement; therefore, agreement between noun and adjective is needless ballast.

Zamenhof's approach was that of the poet who knows intuitively how men feel. In this connection, men do feel, to a greater or lesser degree, that an adjective is more or less the property of the noun to which it is attached rather than a mere modifier of it. As such property, it needs a mark or sign to indicate its ownership just as we mark our own property with a brand or other sign to indicate our ownership of it. This mark of ownership is what grammar calls "agreement" of the adjective.

This feeling that the adjective is a property of the noun is quite a general one throughout all languages. Zamenhof intuitively knew this and made his language follow this feeling. And his intuition was correct although he did not know that some little-known languages like certain American Indian tongues have no adjectives at all. In these languages it is impossible to say this simple sentence: "The eagle is fleet." To express this thought, these languages say: "The eagle has fleetness." That is, they unmistakably make the quality a property of the noun.

Man may be a reasoning animal, but his reasoning is not always based on pure logic. In fact, most of the time he follows feeling rather than logic. Nowhere is this

human tendency more evident than in language. There is no doubt that all of you have many times heard people say something like this: "I don't know nobody in town." Probably you have set this expression down as the result of illiteracy. Certainly the schools are constantly fighting this use of what is called a double negative as illogical and as destructive of itself. Yet, the reason it persists in use is because men feel that the second negative does not really destroy the first one but, rather, that it intensifies it. In Spanish, the feeling got such an upper hand over mere logic that the Spanish Academy finally had to capitulate and accept the "double negative" as the proper form to use.

Throughout Esperanto we can see Zamenhof's poetical insight at work, if we but take the trouble to search a bit. This is what makes the language the living, harmonious structure that it is. Esperanto really is a poem and, in a long poem, the poet may occasionally break his own rhythm or meter in a few lines scattered throughout the work, but these slips do not detract a bit from the value of the work as a whole. Pedants may point to

(Continued on next page)



Monata internacia ilustrita revuo

Prezoj:

Jarabono (nur por kalendara
jaro) kun membreco en Uni-
versala Ligo: \$2.00

Nordamerika peranto:

Donald E. Parrish
328 West 46th Street
Los Angeles 37, Calif.

ZAMENHOF (From preceding page)
 one or two such slips in Esperanto, but the value of Esperanto must be judged as a whole and not by its isolated parts.

The spread of Esperanto has been miraculous. This is true principally, I believe, because its author endowed his language with human feeling. Men of widely different speech feel immediately at home in it as soon as they learn it. If I may quote a German author who was writing about something else, we may say of Zamenhof's creation that: "Es gehört zu jedem Mensch wie das Kleid zur Körper."

If Zamenhof had not subordinated, as he did, his philological knowledge to his poetical insight in the creation of his language, Esperanto would never have spread as widely as it has, nor would it have won for itself the intense loyalty that its speakers feel for it. Let us be thankful that Zamenhof was more of a poet than a philologist.



WARNING!

DON'T send Congress fees, hotel reservations or other communications to the Local Congress Committee in the same envelope with your ballot! Ballot envelopes will not be opened until the Congress.

Mail ballots as directed on ballot!

Introduction to
ESPERANTO
 THE UNIVERSAL LANGUAGE
 The Third Edition . . . REVISED . . . Price \$2.00
 Sent on Five Days FREE Examination!
 BOX 792 • PLACERVILLE, CALIF.

☆“ . . . Estus bone, se en ĉiuj urboj kaj urbetoj estus kreitaj rondetoj por kune labori por la afero de l' lingvo (en kelkaj urboj tiaj rondetoj jam estas kreitaj). Per pripensado kaj laborado kunligita oni ĉiam povas pli multe fari, ol laborante aparte. Sed unu aferon oni ne devas forgesi: ni devas esti atentemaj kaj konstantaj; ni ne devas atendi, ke aliaj nin kuraĝigu per sia ekzemplo, kaj ni ne devas perdi la kuraĝon kaj malvarmiĝi, se ni tiun ekzemplon ne vidos, — ni devas per nia propra laboro doni ekzemplon al aliaj; kaj se en la unua tempo neniu al ni aliĝos, aŭ se oni eĉ ridos je ni, ni devas kredi, ke pli aŭ malpli frue la ridantoj venos al ni. Ni iru kuraĝe antaŭen, ĉar nia afero estas honesta kaj utila!”

L. L. Zamenhof, Originala Verkaro, 1889.

☆“ . . . It would be a good thing if small groups were started in all cities and towns, to work together for the good of the language (in some cities such groups have already been set up). We can always do more by combined thinking and working, than separately. But one thing we must not forget: we must be attentive and steady; we must not wait for others to encourage us through their example, and we must not lose courage and become indifferent, if we don't see such an example, . . . we must give others an example to follow with our own work; and if at first no one joins us, or we are even laughed at, we must believe that sooner or later those laughing will come to us. Let us go bravely ahead, for our cause is an honest and useful one!” L. L. Zamenhof: Original Writings. (Dated, 1889).

SECRETARIAL COMMENT:

You can easily start a local group among a few friends, say five, to meet weekly and study and practice speaking Esperanto. Others have founded local clubs before they even started learning Esperanto!

Ask me for suggestions on starting one in your locality.

wear the green star of Esperanto 25 cents Esperanto pronunciation record, 45 rpm \$1 use Esperanto seals on your mail, \$1 per 100

Your ELNA secretary sells these three Esperanto items in order to earn a few dollars to help out on postage for answering requests for information, sent to us by readers of newspapers who see our letters-to-editors all over the country. Mrs. Mary Gibson has been doing a gigantic job of writing and sending out these letters.

Why not order the above three items today? A copy of a suitable letter will be included, so you can copy or rewrite it in a letter to *your* local editors.

Fisher suggests:

Use one or more of the following items in a letter to your local paper. Be sure to give the readers a chance to find out about Esperanto — include in your letter the address for free information:

The Esperanto League, Meadville, Pa.

NEWS OF ESPERANTO

More and more Russians are learning the international language Esperanto in classes or private study, in order to correspond with people in other communist countries, as well as the outside world. Esperanto was forbidden until just recently, although the government of the USSR favored it during the middle twenties, going so far as to publish the first postage stamps with Esperanto text.

Postage stamps in honor of Esperanto or its founder have been issued by USSR, Austria, Brazil, Bulgaria and Hungary; postal stationery with Esperanto words by them and some others in Europe.

The Yugoslavian Esperanto Federation has been granted a 50% discount on fares for group trips on state-owned railways.

Undoubtedly more than 2000 persons, from all over the world *but using only one language* (Look, Hammarskold! No interpreters!) will participate in the Universal Congress of Esperanto, August 2-9, in Mainz, Germany.

Text of new publicity stickers

(Seals mentioned above)

“LEARN USE the international language. Simple logical, worldwide. Breaks the language barrier. Information free: books, courses, classes, local clubs. THE ESPERANTO LEAGUE, Meadville, Pa.” (with Statue of Liberty, 3-color print.)

Use on mail, packages, etc.

Are you turning to postcards when postal rates go up? If so, use Esperanto publicity cards. Cards with the address side picturing Esperanto lubricating the machinery of the United Nations are available, 2 for 5¢, from: Armin Doneis, Box 105, Pharr, Texas.

ENIGMOEMULOJ

Mi bedaŭras, ke mi devas ellasi vian rubrikon ĉifoje. Ĝi nepre aperos en la aŭgusta numero.



Mi devas lerni Esperanton, por scii kion li respondas.

EXECUTIVE BOARD DECISIONS

- 58-16. Bimonthly payment for Review increased (from \$100) to \$125.
- 58-17. Approved segregating all funds derived directly from services rendered by the Review in a separate accounting by the Treasurer to be sent bimonthly to the Editor together with a detailed statement.

OFFICERS of ELNA

President: Armin F. Doneis, Sr.
Box 105, Pharr, Texas.
Vice-President: Dirk Brink,
Box 5953, Metro Sta., Los Angeles 55, Cal.
Secretary: Conrad Fisher,
RFD 1, Meadville, Pennsylvania.
Treasurer: Edw. W. Pharo, Jr.,
220 County Line Rd., Somerton 16, Pa.

EXECUTIVE BOARD

Adrian Hughes, Chairman,
476 So. Bailey Ave., Hillsboro, Oregon.
Francis E. Helmuth,
P. O. Box 6215. San Diego 6, Calif.
Jarvis E. Bush,
3700 North 75th St., Milwaukee 16, Wis.
David B. Richardson,
3412 North Mullen, Tacoma 7, Wash.
Miss Roan U. Orloff,
31 Nahanton St., Newton Centre 59, Mass.
Elwyn C. Pollock,
2222 Crest Drive, El Cajon, Calif.
Thomas A. Goldman,
719 Chapala Dr., Pacific Palisades, Calif.
Forrest J. Ackerman, 915 S. Sherbourne
Drive, Los Angeles 35, Calif.
Howard G. Borden,
1072 Stuyvesant Ave., Trenton 8, N. J.

Originale Verkita Novelo
LA SEĜO DEKTRIA
de George E. Wagner

Aĉetebla ĉe Esperanto League Book Ser-
vice, aŭ ĉe: Geo. E. Wagner,
403 E. North St., Tampa 4, Florida
Prezo 45 cendoj aŭ 7 steloj.

Army Personnel, Please Note

Quote from a letter to Secretary Fisher from:

E. W. Williams, Colonel, GS
Asst Chief, Tng Div, ODCSOPS

"Those personnel of the Army who desire to study Esperanto in accredited civilian institutions under any of the various Department of Defense or Department of the Army voluntary educational development programs, as a part of their personal education, will receive the same assistance that is provided in the case of the national languages."

ESPERANTO YOUTH MOVEMENT

All members of ELNA or of UEA under 22 years of age are automatically members of TEJO (World Esperanto Youth Organization) and of the ELNA Youth Section.

Every young Esperantist should send his or her name, address and age *now* to:
Charles Powell, Route 1, box 41-A,
Wimauma, Florida.



Deak & Co., Inc.

Foreign Exchange
International Travel
550 South Hill Street
Los Angeles 13, California

Dirk Brink, Branch Manager
Ĉiujn viajn monŝanĝproblemojn ni solvos.
Ĉiujn viajn vojaĝojn eksterlanden per
aeroplano ni aranĝos. Vi povas ŝpari multe
da mono se vi kontaktos nin *antaŭ* via
foriro al eksterlando.

Por ni ne ekzistas monŝanĝproblemoj.
Pagoj el ĉiuj landoj kaj pagoj en ĉiujn
landojn estas por ni ĉiutaga laboro. *Vi
povas ŝpari de 5% ĝis 80%.* Skribu detalojn!

The case of Mr. Gluck

THE CASE of Mr. Gluck, appointed United States ambassador to Ceylon, who did not know the name of that country's Prime Minister, prompts *Sennaciulo*, in Paris, to sarcastic comment on the choice of United States ambassadors. Here are some disturbing facts translated from the Esperanto article in *Sennaciulo*:

"In the NATO countries the United States ambassadors cannot speak French, German, Flemish, Dutch, Norwegian or Turkish. In the very important Arab-speaking parts of the world only three United States ambassadors speak Arabic. In the Soviet Union the new United States ambassador speaks Russian, but in all other communist countries the representatives of the United States do not know the languages of the countries in which they serve. In very important Asia the United States ambassadors in Japan, Nationalist China, Korea, Burma, Siam, Vietnam, Indonesia and the Philippines cannot

speak the native languages. The Americans wonder why the other peoples of the world do not understand and like them."

Sennaciulo draws the conclusion that United States ambassadors are chosen for their financial contributions to political campaigns, not for linguistic competence.

But is it not much more important to consider what might be done for world peace and understanding among the peoples of the world if the diplomats and political leaders of the world would get wise to the need for one neutral international language?

Think it over, and write your conclusions to Messrs. Eisenhower and Dulles.

Local Addresses

Kanada Esperanto-Asocio: Box 52, Terminal A, Toronto, Canada.

Esperanto-Klubo de Los Angeles: 1237 N. Alexandria Ave., Los Angeles 29, Calif.

Washington Esperanto Club: Apt. 101, 2829 Gainesville St., S.E., Wash. 20, D.C.

Esperanto-Societo de San Diego: P.O. Box 6215, San Diego 6, California.

Seattle Esperanto Society: 3231 West 62nd St., Seattle 7, Wash.

Esperanto in Buffalo: P.O. Box 222, Niagara Sta., Buffalo 1, N.Y.

Esperanto Coterie of Texas: P.O. Box 805, Houston 1, Texas.

Esperanto Club of Santa Monica: 855 Franklin St., Santa Monica, Calif.

Esperanto Society of Greater New York: 767 United Nations Plaza, New York 1, NY.

Sacramento Esperanto Club, 5631 Balboa Circle, Sacramento, California.

Esperanto Society of Long Beach: R. C. Betteridge, Pres., 5409 Graywood Ave., Lakewood, Cal.

Skolta Esperantista Ligo, Massachusetts-Grupo, Thomas Duncan, Grupestro, 73 Winchester St., Brookline 46, Mass.

Kontraŭbabela Ligo de Tampa, 403 East North St., Tampa 4, Florida.

H. K. Ver Ploeg, 1908 East 8th Avenue, Spokane 32, Wash.

Jarvis E. Bush, 3700 North 75th St., Milwaukee 16, Wisconsin.

Christie W. Roberts, Rose Valley, Saskatchewan, Canada.

F-ino Ethel Kelley, Birch-haven, RFD 1, Cambridge Springs, Penna.

Mr. and Mrs. Wesley Stevens, 211 North Dithridge Ave., Pittsburgh 13, Penna.

ELNA Youth Section: Charles Powell, Route 1, Box 41-A, Wimauma, Florida.

KONU VIAJN GESAMIDEANOJN



Joseph R. Scherer kaj Familio

Jen eble la plej bone konata esperantisto en Norda Ameriko.

Li estas esperantisto de 1922 (Svislando); UEA-ano dum 30 jaroj; Delegito dum multaj jaroj de 1927 (escepte dum vojaĝoj); Komitatano de UEA 1936–42; membro de Akademio de Esperanto jam proksimume 20 jarojn. Li fondis la E-klubon de Los Angeles 1927; nun prezidanto de tiu klubo; prezidanto de EANA 1935–42.

Li verkis: “Ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo”, “Tra Usono kun ruliĝanta hejmo”; kelkcent artikolojn por Heroldo kaj nacilingvaj gazetoj. Li faris pli ol 1000 prelegojn en 40 usonaj ŝtatoj kaj 47 aliaj landoj; disdonis 10,000 propagandilojn pri Esperanto. (*Ĉu tamen restas laboroj por ni?*)

S-ino Scherer aktivis en societoj de gepatroj kaj geinstruistoj. La du filinoj, Heidi kaj Antoinette, estas 12-jaraj. La familio vartas ĝofulinojn ankoraŭ ne leĝe adopteblaj. La nuna tia vartfilino estas 1-jara Elena Maria Cortes.

(*Mi esperas ke vi renkontos la familion Scherer ĉe la Kongreso. frc*)

el New York

RAPORTO pri nia HELP-AKTIVECO por la Esperantistoj en Hungario de Ralph R. Bonesper

Tuj post la katastrofa civila milito en Hungario ni kontaktiĝis kun la Esperantista Helpkomitato en Budapeŝto por organizita help-sendado al la esp-aj viktimoj. Ni konkludis, ke la plej ekonomia kaj plej efika helpo estos sendi uzitajn vestaĵojn, ŝuojn kun iom da sapo kaj sekigita lakto en pakajoj. La New York-a Esp.-Societo organizis kolektadon de vestaĵoj ĉiuspecaj kaj ŝuoj, kiu eĉ tro bone sukcesis. La materialo kolektita sufiĉis por 13 grandaj pakajoj de 20 ĝis 30 funtoj. Por la sendkosto ni kolektis monon ĉe niaj kunvenoj en New York. Ankaŭ individuaj ges-anoj en kaj ekster New York malavare kontribuis por ŝveligi la helpkason. Ĉar dum la lastaj jaroj la sendkosto de pakajoj pli ol duobliĝis, la sendkosto estis multe pli ol ni anticipis. Por eviti deficiton, necesis utiligi la tutan profiton el kongresaj glumarkoj por la helpkaso.

De Budapeŝto kaj Debrecen oni raportis ricevon de ĉiuj sendaĵoj. Ĉiun sendaĵon oni dispartigis inter 6–8 ges-anoj kiuj bezonis kaj meritis helpon. Monkolektoj en kunvenoj de la N. Y.-a Esp-a Societo: \$25.15. Individue donacis: Gabor \$10; Gamble \$5; Dormont \$6.20; Marble \$3.50; Faltus \$1; Winter \$3; Barta \$2; Bonesper \$15. Profito el kongres-glumarkoj \$21.72. Tuta enspezo \$92.57. Elspezo por poŝto, preparado, sapo kaj sekigita lakto por 13 sendaĵoj \$104.40. Restas nevenditaj kelkmil glumarkoj, belaj kaj uzindaj propagandecoj, per kies vendado ni esperas elviŝi la deficiton, espereble eĉ sendi pluajn pakajojn. La bezono pri vestaĵoj restas urĝa.

Mendu glumarkojn (200 markoj por \$1)
ĉe: Ralph R. Bonesper,
361 West, 44th St., Apt. 5–D,
New York 36, N. Y.

Complete Grammar, Alphabet and Pronunciation of Esperanto

THE ALPHABET

a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z.

The sounds of the vowels (a, e, i, o, u) are the vowel sounds in: "Are there three or two?" The consonant sounds are as in English, except: *c* as *ts* in *hats*, *ĉ* as *ch* in *church*, *g* as in *go*, *ĝ* as *gem*, *ĥ* as *ch* in *loch*, *j* as English *y*, *ĵ* as *z* in *azure*, *s* as in *so*, *ŝ* as English *sh*, *ŭ* as English *w*.

THE GRAMMAR

1. There is no indefinite article; there is only a definite article (*la*) alike for all sexes, cases and numbers.

2. Substantives end in *o*. To form the plural, *j* is added. There are only two cases: nominative and accusative; the latter is obtained from the nominative by adding *n*. Other cases are expressed by prepositions (genitive *de*, dative *al*, ablative *per*, etc.)

3. The adjective ends in *a*. Case and number as for substantives. The comparative is made by means of the word *pli*, the superlative by *plej*; with the comparative the conjunction *ol* is used.

4. The fundamental numerals (not declined) are: *unu*, *du*, *tri*, *kvar*, *kvin*, *ses*, *sep*, *ok*, *naŭ*, *dek*, *cent*, *mil*. Tens and hundreds are formed by simple junction of the numerals. To mark the ordinal numerals, *a* is added; for the multiple *obl*; for the fractional, *on*; for the collective, *op*; for the distributive, the preposition *po*. Substantive and adverbial numerals can also be used.

5. Personal pronouns: *mi*, *vi*, *li*, *ŝi*, *ĝi*, *si*, *ni*, *vi*, *ili*, *oni*; possessives are formed by adding *a*. Declension as for substantives.

6. The verb undergoes no change with regard to person or number. Forms of the verb: time *being* (present) takes the termination *-as*; time *been* (past) *-is*; time *about-to-be* (future) *-os*; conditional mood

-us; imperative mood *-u*; infinitive *-i*. Participles (with adjectival or adverbial sense): active present *-ant*; active past *-int*; active future *-ont*; passive present *-at*; passive past *-it*; passive future *-ot*. The passive is rendered by a corresponding form of the verb *esti* (to be) and a passive participle of the required verb; the preposition with the passive is *de*.

7. Adverbs end in *e*; comparison as for adjectives.

8. All prepositions govern the nominative.

9. Every word is pronounced as it is spelled.

10. The accent is always on the next-to-last syllable.

11. Compound words are formed by simple junction of the words (the chief word stands at the end). Grammatical terminations are also regarded as independent words.

12. When another negative word is present, the word *ne* is left out.

13. In order to show *direction toward*, words take the termination of the accusative.

14. Each preposition has a definite and constant meaning; but if the direct sense does not indicate which it should be, we use the preposition *je*, which has no meaning of its own. Instead of *je*, we may use the accusative without a preposition.

15. The so-called foreign words (that is, those taken from one source) undergo no change in Esperanto, beyond conforming to its orthography; but with various words from one root, it is better to use unchanged only the fundamental word and to form the rest from this in accordance with the rules of the Esperanto language.

16. The final vowel of the substantive and of the article may sometimes be omitted and replaced by an apostrophe.

worth repeating...



The World
Needs
ESPERANTO
NOW

"There is a great need for greater understanding as a foundation for world peace."
Bob Hope

The great worldwide organization to promote Esperanto
for people of all nations, all religions, all political beliefs
IS

Universala Esperanto-Asocio

Representative in U. S. A.: D. E. Parrish, 328 West 46th St., Los Angeles 37, Calif.
In Canada: W. D. B. Hackett, 362 Soudan Ave., Toronto, Ont.

MEMBERSHIP, YEARLY DUES: With Yearbook only, \$1.90; with Yearbook and magazine, \$3.75; Sustaining Member, \$5.75. Life Member, \$75.00.

The ONLY North American organization affiliated with UEA is
Esperanto League for North America

Every member of the League is a member of UEA

JOIN NOW. Regular Member, \$3; Man and wife (each with Regular Member privileges, but receive only one copy of publications), \$4; Supporting Member, \$5; Patron, \$10; Life Member, \$50. Make checks payable to: Esperanto League for North America, Inc. Secretary: Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pennsylvania.

READ: Heroldo de Esperanto, \$4.00 per year; La Praktiko, \$2.00.